

# STARTO

**N-ro 1/2014 (250)**

**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



foto Luděk Neuzil

*Maskerado ĉirkaŭ la morto en la ĉeĥa iras en la mondon*

editoro Humphrey Tonkin  
tradukintino Jinřiška Drahotová  
eldonisto Petr Chrdle

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,  
aperas 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz

**Identec-numero (IĈ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz

**Libroservo:** p/a Anna a Jiří Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Muzeo:** muzeagrupo@esperanto.cz

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

**BANKO-KONTO de ĈEA:**

2800 186 228/2010

**Fio banka Svitavy**

## Komitato de ĈEA:

**Prezidanto: Vladimír Dvořák,** Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 999 091, vladimir.dvorak@esperanto.cz, (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

**Vicprezidentino:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, libuse.dvorakova@esperanto.cz (Muzeo de Svitavy, rilatoj al urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

**Kasisto:** Vratislav Hirsch, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membrodatumbazoj, kontaktoj)

**Komitatanino:** Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavla.dvorakova@esperanto.cz (membroj, kluboj, sekcioj, konferencoj, informado, retaj projektoj, ekspozicioj)

**Komitatano kaj redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. UPC 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

**Komitatano:** Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, tel. 608 224 993, miroslav.hruska@esperanto.cz (junularo, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio kaj UK-peranto:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

## Revizia komisiono de ĈEA:

**Prezidanto:** Jan Řepa (Fidel), Na Valše 250, 38411 Netolice, fidel@razdva.cz

Věra Gavandová, Komenského 657, 789 61 Bludov, vgavandova@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 09 Pardubice, ludmila.srbova@seznam.cz

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorfer domo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy, direktorino: Blanka Cuhelová, tel. 461 532 704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

**Kontrollegis:** Sabine Hauge, la komitato.

# KIEL VI MEM POVAS PARTOPRENI EN LA ASOCIAJ AKTIVECOJ?

*moto: "ĈEA estas ne komitato, sed ni ĉiuj!"*

Estimataj ĈEA-membroj!

En la numero 2013/4 vi povis legi la raporton de la ĈEA-prezidanto, kiu dum la konferenco en Nymburk resumis staton de plenumado de la alprenitaj prioritatoj en nia asocio. Nemalmulto sukcesis aŭ progresis, same nemalmulto stagnas aŭ atendas pluan disvolviĝon pro manko de kunlaborantoj (aŭ de financoj).

Estus logike en tiu ĉi numero, kune kun la budĝeto por 2014 listigi ankaŭ niajn nunajn agadcelojn. Tamen, verkante ĝin, ni rimarkis, ke grandparte temas pri administraj aŭ organizaj taskoj, kiuj apartenas al komitatoj aŭ komisiitaj plenumantoj. Legi tian liston estus iom tede. Pli gravas, en kiuj aktivecoj-projektoj povas partopreni VI MEM (ĉu kiel individuoj, ĉu kiel membroj de kluboj aŭ sekcioj). Nur tiel nia organizo povas plenumadi sian celon kaj havi veran sencon. Estu laŭeble ĉies libervola devontigo laŭ siaj eblecoj iel kontribui, ne nur konsumi rezultojn de alies laboro.

Jen rigardu la liston de la plej gravaj nuntempaj aktivaĵoj de ĈEA.

Ĉu vi mem aŭ via klubo trovas en ili ion interesa kaj partopreninda?

## **NOVA TUTJARA EKSPozICIO EN ESPERANTO-MUZEO EN SVITAVY**

La nuna arta ekspozicio "Esperanto kaj muzoj" estos fine de septembro 2014 anstataŭita per la nova "ESPERANTO KAJ KOLEKTADO".

Temos pri a) "Esperantaĵoj" (poŝtmarkoj, bildkartoj, insignoj, glumarkoj, suveniroj, aliaj tridimensiaj objektoj) b) "Ĉio kion kolektas esperantistoj"

(neesperantaj objektoj, laŭeble kuriozaĵoj, ekz. nekutimaj suveniroj el Esperanto-vojaĝoj). Ĉu vi havas ion interesan por prezenti, kion vi pretus senpage pruntedoni por unu jaro? Bv. sendi al ni vian oferton kun priskribo, ev. fotaĵojn de tio, kion vi povas pruntedoni. Ni garantias enordan redonon. Ĉar dume la asocia budĝeto pliboniĝis, ni povas ev. repagi kostojn por sendo aŭ resendo (kvankam ni preferos personan transdonon). Tamen bv. ne sendi tuj, sed nur post antaŭa interkonsento!

## **MIGRA EKSPozICIO "Ĉu Esperanto estas morta lingvo?"**

Ĝi gastis jam en 27 institucioj en 9 regionoj de la lando kaj finiĝos verŝajne en 2015. Ĉu vi volus helpi organizi ĝin ankaŭ en via urbo (plej taŭge en biblioteko)? Ĉi-momente restas kvin liberaj monatoj por povi rezervi ĝin. Petu pliajn informojn pri la kondiĉoj! Ne postulatas via mono, nur helpo dum (mal)instalado, loka informado kaj ev. pretigo de la inaŭguro aŭ publika programo (ne nepre). Jen unika okazo por videbligi Esperanton ĉe vi!

## **MEMORO DE LA MOVADO**

Ne ĉiuj kluboj havas tiel modele prilaboritan historion de la Esperanto-movado en sia regiono, kiel ekz. Přerov, Prostějov aŭ Pardubice. Ni instigas klubojn serĉi, kolekti kaj skani historiajn fotojn kaj gravajn dokumentojn kaj serĉi biografiajn informojn pri gravaj esperantistoj el via ĉirkaŭaĵo. En [http://eo.wikipedia.org/wiki/Listo\\_de\\_ĉeĥaj\\_esperantistoj](http://eo.wikipedia.org/wiki/Listo_de_ĉeĥaj_esperantistoj) vi povas vidi, kies nomoj ankoraŭ mankas aŭ ĉe kiuj nomoj ankoraŭ aperas malmultaj informoj aŭ mankas fotoportretoj. Eble de tiuj personoj konserviĝis iliaj verkoj, kiuj devus esti en la asocia arkivo. Koncerne teknikan prilaboron kaze de bezono vi povas peti konsilon de ni.

## **CIFERECIGADO (= digitalizace) DE ESPERANTO-MATERIALOJ**

Multo el nia Esperanta kultura heredaĵo ankoraŭ atendas sian arkivadon en komputilo kaj sekve ev. disponigon en interreto.

- Ĉu vi scipovas senerare tajpi? En nia arkivo multas valoraj manuskriptoj (beletraj, lingvaj, fakaj, movadaj), kiuj atendas sian transskribon kaj transformon al elektronika formo.

- Ĉu vi bone konas la lingvon kaj havas "atenteman okulon"? Ni bezonas ankaŭ ekzaktemajn legantojn por kontrolo de eraroj kaj mistajpoj en la ciferecigitaj tekstoj.

- Se vi pli amikas kun komputilo, ni bezonas ankaŭ homojn por skanado de fotoj kaj artikoloj, por ciferecigado pere de komputila programo (instrukiadon ni prizorgos), por transformado de diskoj kaj kasedoj al mp3 aŭ por ciferecigo de videoj.

## **PROJEKTO "FONOTEKO"**

Ni serĉas volontulojn por sonregistri tekstojn taŭgajn por studado de Esperanto, ĝenerala kleriĝo aŭ amuziĝo. Instruado okazos i.a. dum la 9-a Sabla Printempo en Skokovy (13.-18.5.). Interesitoj povos esti instrukciataj ankaŭ perrete (koncerne laboron kun voĉo kaj laboron kun la programo Audacity). La registraĵoj povos esti disponigitaj por internacia uzo (en eksterlandaj retaj radioj, en la projekto Bretaro.org, Lernu.net, en multlingvaj projektoj kiel Librivox.org ktp). La materialoj por Esperanto-instruado povos esti eldonitaj en formo de KD. Skribu al ni viajn ideojn/preferojn aŭ petu liston de proponataj tekstoj por elekti. Jen interesa sencohava laboro por viaj klubaj kunvenoj, en kiu pluraj homoj povas partopreni! Ev. vi povas mendi ankaŭ instrukciadon rekte en via klubo - laŭ niaj ebloj ni klopodos trovi konvenan daton kaj veni.

## **PROJEKTO "KAREL ČAPEK"**

La 20-an de septembro ni prezentos niajn tradukojn kaj sonregistraĵojn dum la publika kultura aranĝo en la Memormuzeo de Karel Čapek en Strž apud Dobříš. Por tio ni i.a. volas realigi novajn tradukojn al Esperanto el lia verkaro - prefere mallongajn artikolojn kaj felietonojn pri ĝis nun aktualaj temoj (ekz. la libroj "Marsyas", "Jak se co dělá" ktp). La ĉeĥlingvaj originalojn vi povas senpage elŝuti en [www.mlp.cz](http://www.mlp.cz). Membroj de la tradukgrupo konsilos kaj helpos vin por atingi postulatan kvaliton de la traduko. La tradukoj povos esti publikigitaj en interreto aŭ ev. ankaŭ voĉregistritaj.

## **KONTRIBUADO AL STARTO KAJ WWW.ESPERANTO.CZ**

Ambaŭ informiloj pli buntos kaj pli legindos, se kunkreos ilin pli da homoj!

Por Starto ni serĉas ekz. iun por kontribui al "Lingva rubriko" (eĉ surbaze de malnovaj Startoj) kaj al la rubrikoj "Humuro" kaj "Por komencantoj". Kion vi volas trovi kaj legi en la gazeto? Ĝi ne devas esti nur informilo pri intaj kaj ontaj aranĝoj. Same por [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) ni bonvenigos de vi taŭgajn aktualaĵojn (kiujn ni sekve adaptos en redakta kodo por publikigo). I.a. ni serĉas iun por rubriko "Poĉítaĉová gramotnost". Skribu al ni viajn ideojn pri temoj aŭ rekte proponon de la teksto! Helpus nin ekz. kunlaboranto sekvanta novajn interesajn artikolojn kaj videojn en Interreto aŭ novaĵojn en eksterlanda Esperanto-gazetaro, pri kiuj ni povos informi.



## **TRADUKADO DE URBAJ RETEJOJ KAJ DE ĈIĈERONAJ TEKSTOJ**

Jen unu moderna kaj efika maniero por videbligi Esperanton kiel utilan praktikan lingvon. Post ĉiu Esperanto-aranĝo laŭeble devintus postresti krom fotoĵoj ankaŭ unu tia daŭra publike havebla materialo! Nuntempe ni ekz. tradukas tekston pri Bierfara muzeo en Plzeň, pri kies konservo la muzeo mem montris intereson. Skribu al ni por listo de proponataj konkretaj tekstoj taŭgaj por traduko (dividitan laŭ regionoj). Kadre de la estiĝonta tradukgrupo ni povos komune solvi malfacilajn vortojn/parolturnojn kaj komune poluri la tekstojn. Temas pri afero prestiĝa ankaŭ por via prezentiĝo en via urbo, ĉar vi faros ion por ĝi utilan kaj povos diskonigi vian regionon eksterlande. Ni donos al vi subtenon kiel konkrete fari tion. Laborseminario pri tiu ĉi temo estas preparata por 29.9.2014 en Svitavy (dimanĉe post sabata inaŭguro de la nova ekspozicio).

## **PLUAJ PROJEKTOJ KAJ AGADCELOJ**

Krome povas temi pri: verkado de ĉeflingvaj artikoloj pri Esperanto, vigligo de konkreta internacia kunlaboro, kreado de instruhelpiloj por lingvokursoj, kolektado de interesaj materialoj por klubaj kunvenoj aŭ aranĝoj, reklamado por E-kursoj, eldonaj aktivecoj, kreado de strategioj por serĉado de sponsoroj, verkado por Vikipedio, subtekstigado aŭ dublado de mallongaj filmoj, kreo de prezentaĵo kaj metodiko por gvidado de "fulmokursoj" k.a. Ĉio ĉi povos plu iom post iom disvolviĝi, sed nur kaze de via intereso kaj aktiva laboro!

Bv. skribi viajn proponojn/demandojn al

**PAVLA.DVORAKOVA@ESPERANTO.CZ** aŭ al poŝtadreso de la koncernaj komitatanoj (vidu la paĝon 2). Ni antaŭĝojas vian helpemon kaj nian komunan kunagadon.

*-padv-*

Výsledek hospodaření ČES za rok 2013, plán na rok 2014  
a přehled o majetku, pohledávkách a závazcích (v Kč).

<b>Příjmy</b>	rok 2013	plán 2014	Přehled o majetku, pohledávkách a závazcích k 31.12.2013	
Příspěvky na běžný rok	22 820	23 000	<b>peněžní prostředky</b>	
Příspěvky dobrovolné	13 135	14 000	pokladna korunová	4 362
Příspěvky na budoucí rok	24 052	25 000	ceniny	3 450
Dary členů	40 200	13 000	postkonto	1 723
Dary nečlenů	4 000	0	účet Fio	100
Dotace	12 000	1 000	účet Fio spořicí	218 977
Starto předplatné	1 028	1 000	<b>peníze celkem</b>	<b>228 612</b>
Konference a sjezdy	57 334	110 000	<i>změna vůči 31.12.2012</i>	47 651
Činnost klubů a sekcí bez PS	859	5 000	<b>investice</b>	
Muzeum	0	0	podílové listy	184 986
Libroservo	8 077	8 000	<b>investice celkem</b>	<b>184 986</b>
Kurzy esperanta	3 320	4 000	<i>změna vůči 31.12.2012</i>	-1 172
Příspěvky UEA ind. běžný rok	12 440	7 000	<b>pohledávky</b>	
Příspěvky UEA ind. budoucí rok	26 156	30 000	UEA subkonto	44 356
Platby UK na běžný rok	142 694	0	Klub Brno	2 400
Platby UK na budoucí rok	5 700	120 000	<b>pohledávky celkem</b>	<b>46 756</b>
Platby ILEI a pedagog. komise	450	700	<i>změna vůči 31.12.2012</i>	13 544
Úroky z účtů	305	200	<b>ostatní majetek ČES</b>	
Virtuální adresa	500	500	vybavení muzea v ceně pořízení	141 932
Cigno	42 692	-	knihy v libroservu (odhad)	29 000
Pohledávky klubů a sekcí s PS	0	2 400	.....	
<b>Příjmy celkem</b>	<b>417 762</b>	<b>364 800</b>	<b>ostatní majetek ČES celkem</b>	<b>170 932</b>
			<i>změna vůči 31.12.2012</i>	-5 601
<b>Výdaje</b>	rok 2013	plán 2014	<b>závazky</b>	
Starto tisk	25 860	23 000	platby pro UEA	4 550
Starto distribuce	13 980	14 000	platby pro UK	5 700
Konference a sjezdy	66 718	100 000	<b>závazky celkem</b>	<b>10 250</b>
Činnost klubů a sekcí bez PS	8 233	5 000	<i>změna vůči 31.12.2012</i>	-14 061
Administrativa, kancel. pořeby	2 378	2 500	<b>účelově vázané prostředky</b>	
Jízdné funkcionářů	5 085	7 500	fond Tilio	27 392
Přísp. na stravné za schůze	650	650	fond ediční	12 660
Muzeum	16 105	20 000	fond Cigno	38 692
Libroservo nákup zboží	2 200	10 000	kluby a sekce bez právní subj.	78 977
Libroservo poštovné a balné	482	600	<b>celkem</b>	<b>157 721</b>
Kurzy esperanta	1 395	500	<i>změna vůči 31.12.2012</i>	33 923
Příspěvky UEA ind. běžný rok	22 140	11 550	Pozn:	
Příspěvky UEA ind. budoucí rok	21 606	30 000	Dary tvoří zejména vysoký obnos od dárců	
Platby UK v běžném roce	142 694	5 700	v anonymitě a sponzorské dary na pomník	
Platby UK na budoucí rok	0	120 000	a strom v Lipnici a dále dary pro konferenci.	
Platby ILEI a pedagog. komise	503	700	Z fondu Cigno byly dotovány semináře ve	
Kolektivní členství v UEA	1 040	1 200	Skokovech.	
Kolektivní členství v EEU	1 257	1 400	Do muzea jsme nakoupili laminovačku.	
Blahopřání, kondolence	885	1 000		
Poplatky bance	29	100		
Poskytnuté dary	19 560	4 000		
Záv. ke klubům a sekcím s PS	0	0		
<b>Výdaje celkem</b>	<b>352 800</b>	<b>359 400</b>		

## Semajno de Internacia Amikeco 2014

okazis ankaŭ en Bydgoszcz kaj Torun, organizita de Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo (ISTK) en Bydgoszcz. Jam sabate la 15.02.2014 renkontiĝis ISTK-studentoj el Taĝikio kaj Uzbekio, kiuj prezentis siajn landojn, kaj vespere ĉiuj partoprenis la 6-an Internacian Vesperon de Kulturo kaj Ortodoksa Muziko en Altlernejo de Bydgoszcz kun kelkcent partoprenantoj. Ĵaŭde la 20-an de februaro okazis Ĉina Tago en ISTK, dum kiu delegacio el Ĉinio prezentis kulturon kaj turismon de Ĉinio, ankaŭ en Muzeo de Diplomatio de Universitato de Kazimiro la Granda (UKW) en Bydgoszcz. Merkrede la 19-an de februaro oni vizitis urbon Torun, Etnografian Muzeon kaj Domo de Kopernik. Rezulte de tio Domo de Nikolao Koperniko decidis renovigi belegan aŭdvidan panoramon de la urbo Toruń en Esperanto. Vendrede la 21-an de februaro 2014 okazis akcepto de ĉina delegacio kaj aliaj ĉe Vicprezidanto de Urba Konsilio de Bydgoszcz honore al Esperanto-agado en Bydgoszcz.

### **Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz, Pollando**

Plena eduk-ciklo daŭras tri jarojn kaj permesas akiri sciojn necesajn por labori en naŭ profesioj (simboloj de Eŭropa Unio):

**post la 1-a studjaro** – akireblaj kvalifikoj: lektoro de Esperanto por komencantoj kaj gvidanto de porinfanaj aranĝoj; profesioj/postenoj: oficisto pri turisma

informado, oficisto en vojaĝagentejo kaj internacia vojaĝ-gvidanto; Esperanto-instruado laŭ niveloj A1 kaj A2 de Konsilio de Eŭropo

**post la 2-a studjaro** – kvalifikoj: lektoro de mez-nivelaj kursoj de Esperanto kaj kreanto de arta ceramiko; profesioj/postenoj: organizanto de turisma priservado, regiona turisma ĉiĉerono kaj animanto de kultura agado; Esperanto-instruado laŭ niveloj A1, A2 kaj B1 de Konsilio de Eŭropo

**post la 3-a studjaro** - profesioj/postenoj: kursgvidanto de Esperanto, specialisto pri organizado kaj disvolvo de turismo kaj specialisto pri organizado de kulturo – kulturscianto; ev. titolo de bakalaŭro de AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj) pri humanistiko aŭ morfosciencoj kaj Esperanto-instruado laŭ niveloj B2 de Konsilio de Eŭropo.  
<http://www.esperanto-studium.za.pl/>

## **Nova libro**

La eldonejo Academia de Ĉeĥa Akademio de Sciencoj, preparas eldoni libron "Naše vize Evropy" (Niaj vizioj de Eŭropo). La libro havos pli ol kvarcent paĝojn kaj la eldonanto elektis ĉirkaŭ dudek aŭtorojn el nia respubliko, ekz. Sokol, Pithart, Halík, Zahradil, Vlk ... kaj ankaŭ mian modestan personon. Mia parto (de p. 362 ĝis p. 370) enhavas naŭ artikolojn, inter ili "Díl jazykové politiky" (Parto de lingvopolitiko) pri Esperanto.

La libro estas aperonta en majo 2014.

*Max Kašparů*

# Printempaj regionaj renkontiĝoj

## OKCIDENT-BOHEMIA RENKONTIĜO

la 15-an de marto 2014 en Plzeň

Je 10:30 trarigardo de la migra ekspozicio pri Esperanto en Studa kaj scienca biblioteko (Smetanovy sady 2) kun akompana programo. Komuna tagmanĝo, interkonatiĝo, planado de regionaj aktivecoj, kantado; promeno tra la urbocentro, esperantlingva ĉiĉeronado tra historia Bierfara muzeo, sekva babilado kaj biergustumado en la muzea bierkelo

Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz), Pavla Dvořáková tel. 774 942424

Por aliĝintoj ĝis 10.3. garantiatas tagmanĝo kaj sidloko en la salono

## RENKONTIĜO ĈE BOHEMIA- MORAVIA LANDLIMO

la 26-an de aprilo 2014 en Litomyšl

Faka ekskurso al nova maŝin-industria entrepreno CIMBRIA kaj trarigardo de la Nova preĝejo (konstruita en 2009-2010). Komuna tagmanĝo kun posttagmeza kleriga kaj amuza programo.

Info: [svitavy@esperanto.cz](mailto:svitavy@esperanto.cz), Libuše Dvořáková tel. 604 377 616

## PRINTEMPA RENKONTIĜO DE ESPERANTO-KLUBO ŠUMPERK

la 17-an de majo 2014 en banloko  
Bludov

Renkontiĝo je 9:50 antaŭ la baneja konstruaĵo. Trarigardo de la banloko kaj unuhora rilaksado en baseno kun kuraca akvo. Trarigardo de la preĝejo kaj kriptoj de la nobela familio Žerotín, tagmanĝo en apuda stila restoracio kun sekva programo (precizigota).

Info: [kvidojanik@seznam.cz](mailto:kvidojanik@seznam.cz),  
Kvido Janík tel. 605 226 314

Pli detalajn informojn bv. sekvi en  
Kalendaro de aranĝoj en  
[www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz)

## 28-AJ ESPERANTO-TAGOJ EN KRAKOVO

la 30-an de majo ĝis la 1-a de junio 2014

Memorante pri la 650-a datreveno de Jagelona Universitato en Krakovo.

Inaŭguro okazos vendrede, (30.05.) je la 12.00 h. Ni antaŭvidas riĉan kaj varian programon: popularajn kaj sciencajn prelegojn, koncertojn, renkontojn kun famaj personoj, vizitadon de interesaj lokoj.

<http://esperantujo.w.interia.pl/index2.htm>



# 45 jaroj de ĈEA

Inter la 29-a kaj 30-a de marto 1969 en Brno estis fondita Ĉeĥa Esperanto-Asocio en sia konstitua kongreso. Pri la kongreso ni jam skribis en Starto 1/2009 okaze de la 40-jariĝo, la fotojn oni trovos ĉe <http://www.medy.cz/brno-esperanto/konstituo.htm>.

Dum la pasintaj 45 jaroj ĉiujare okazis asocia konferenco aŭ kongreso (en kongreso oni elektas novan estraron) kaj ankaŭ pluraj aliaj aranĝoj. Inter ili elstaras kulturaj festivaloj en Opava kaj Ústí nad Labem, renkontiĝoj de pac-defendantoj en Pardubice kaj AESToj (seminarioj pri apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko), ĉiam en alia ĉeĥa aŭ slovaka urbo. Menciindas ankaŭ baloj kaj Silvestroj, marŝoj al Ĉantoryja, diversaj renkontiĝoj organizataj de lokaj kluboj aŭ sekcioj, tendaroj en Lančov kaj Sebranice, nun lernejo en Bartošovice.

La plej grava internacia aranĝo estis UK 1996 en Prago, krom ĝi ni povas fieri ankaŭ pri tri OSIEK-konferencoj (Strážnice, Prago, Svitavy), fervojistaj kongresoj (Olomouc, Liberec), junulara kongreso (Liberec), SAT-kongresoj (Strážnice, Karlovy Vary), IKUE-kongresoj (Kroměříž, Olomouc, Velehrad), KELI-kongresoj (Janské Lázně, Strážné, Poděbrady, Svitavy) kaj ILEI-konferencoj (Tábor, Karlovy Vary).

En 1993 la biblioteko Šustr de la Praga E-klubo transiris al la urba muzeo en Česká Třebová kaj fariĝis tiamaniere nia unua muzea librokolekto, kvankam nur en deponejo por esploristoj. En 2008 nia asocio sukcesis en Svitavy starigi veran Esperanto-muzeon kun regulaj ekspozicioj por la publiko kaj kun kulturaj aranĝoj.

Tre riĉa agado estis sur la kampo literatura. Aperis pluraj verkoj fakaj (*AEST-kajeroj, Pri la varmo, juraj vortaroj, La fonemo ĥ, Ĉu leŭcito en Bohemio, Ĥemia vortaro*) kaj historiaj (*Historio de la E-movado en Ĉeĥoslovakio, Meze de Eŭropo, Ĉiam malnova kaj ĉiam nova*), kompreneble ankaŭ lernolibroj kaj vortaroj (*Kilian, Cink, Barandovská, Prachař, Melichárková, Chrdle, Marček, Hromada, Kraft, Malovec, Vlková*).

Tamen plej multaj verkoj estis beletraj, danke al niaj tradukantoj (*Lukáš, Hromada, Pumpr, Kořínek, Kilian, Vondroušek, Váňa, Krolupper*) kaj aŭtoroj originalaj (*Urbanová, Píč, Rumler, Karen*). Ni menciuj ekz. la verkojn de Karel Čapek (*Libro de apokrifoj, Poŝrakontoj, Milito kontraŭ salamandroj*), Jaroslav Hašek (*Ne nur soldato Ŝvejk, Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk*) kaj de aliaj aŭtoroj (*Propra biografio de Karolo IV., Riporto skribita en pendumila maŝo, Majo, Aŭdienco, Ondro kaj drako, Knaboj de Kastora Rivero*).

Nian literaturon riĉigis ankaŭ literaturaj suplementoj de Starto nomataj Panoramo kaj ĉeĥaj numeroj de internacia gazeto Paco, multaj tradukoj el la ĉeĥa literaturo aperis eksterlande, ne nur en gazetoj, sed ankaŭ libroforme (*Flugilhava ŝtono, Litomiŝla tombejo, Hetajro dancas*).

En lastaj jardekoj esperantistoj kunlaboras kun ĉeĥaj poetoj (*V. Ludíková, Z. Bergrová, M. Dolistová, A. Melicharová, L. Vondroušková, Ĉ. Vidman*) kaj enĉeĥigas esperantlingvajn verkojn (*J. Drahotová*).

Rete reviviĝis Verda Stacio.

-mm-

## ĈEA-kongreso okazos 24.-26.10.2014 en Prostějov

Ĉi-jare necesas elekti novan asocian komitaton, tial okazos ne konferenco, sed kongreso. La gastiganta urbo estos Prostějov, kies kandidatiĝo estis akceptita dum la ĈEA-konferenco en Nymburk. En la urbo ne nur funkcias aktiva Esperanto-klubo, sed ankaŭ troviĝas Esperanto-monumento kaj Esperanta strato. Nun ni alportas al vi ĝeneralan prezentiĝon de la urbo kaj bazajn informojn pri la lokaj kondiĉoj.



nova urbodomo

secesia Nacia domo

La distrikta urbo Prostějov situas en la centro de Moravio en *Prostějovská pahorkatina* oriente de *Drahanská vrchovina* sur la dekstra bordo de la rivereto Hloučela, 225 m super la marnivelo.

La unua historia mencio pri la vilaĝo Prostějovice estas el la jaro 1141. Ĝis la mezo de la 13-a jarcento ĝi evoluis al signifa foira vilaĝo, en 1390 avancigita je urbo. Prostějov nuntempe havas 45 000 loĝantojn. Trafike ĝi estas senprobleme atingebla, buse, aŭte kaj ankaŭ trajne direkte el Olomouc kaj Brno.

La urba simbolo estas la nova urbodomo kun 66 m alta turo kaj astronomia horloĝo. Kadre de la posttagmeza promeno la kongresanoj vizitos muzeon en la renesanca eksa urbodomo kaj vidos la kastelon, la gotikan paroĥan preĝejon kaj valorajn secesiajn kaj konstruismajn konstruaĵojn, pro kiuj Prostějov unikas kaj prave fieras.

Krom la ekskurso, dum la ĈEA-kongreso kiel kutime atendas vin ne nur necesa labora programo, ĉi-foje kun balotado, sed ankaŭ diskutoj, kleriga programo kun projekciado, komuna muzikumado kaj tradicia sabata dancvespero kun tombolo (kaj kun ebla kultura surprizo).



kastelo



muzeo

Loĝigo estas certigita en studenthejmo (strato Palečkova 1) en trilitaj ĉambroj (dultitaj por geedzoj) kun duŝejoj/necesejoj surkoridore. Samloke okazos manĝoj kaj vendreda vespera kaj dimanĉa antaŭtagmeza programoj. Se la lokoj ne sufiĉos, disponeblos ankaŭ tranoktejo en la strato Fanderlíkova. Pli komforta loĝado mendeblos individue en pensionoj. La ĉefa sabata laborprogramo kaj la dancvespero okazos en kultura salonego de Domo de servoj.



studenthejmo



kongresejo

Detalaj informoj kun la aliĝilo aperos en Starto n-ro 2, aperonta en junio. ĈEA-komitato elkore invitas vin kaj antaŭĝojas vian abundan ne nur ĉeeston, sed ankaŭ aktivan partoprenon.

## Ankro 2013

**Tradicia Antaŭkristnaska Renkontiĝo** (AnkRo) okazis en Písek ĉi-foje jam la 30-an de novembro, la unuan tagon de Advento. Partoprenis denove gastoj ankaŭ el EK Prago, Benešov kaj Pilseno kaj gasto el Svislando (vidu la fotojn).

La kvina adventa matineo, okazinta kiel kutime en klubejo de la urba biblioteko, ofertis kristnaskan kulturalan programon ankaŭ por la urba publiko.



Ĉi-foje oni parolis pri Sankta Andreo kaj ankaŭ pri popola sanktandrea sorĉado, kiun la partoprenantoj mem povis elprovi. Post adventa medito pri arboj en prezento de M. Smyčka eksonis esperantlingve fama ario Ombra mai fiu de Händel (ĉar surprize fakte temas pri unika amkanto al arbo) kaj oni rememorigis interesan sorton de tiu ĉi kanto, kiu i.a. estis entute la unua kanto disaŭdigita en radio (ĝuste la 24-an de decembro 1906).

Pavla Dvořáková kantis kiel premieron sian tradukon de la kanto "Zafúkané" de la muzikgrupo Fleret, medalionon pri Čestmír Vidman prezentis Margit Turková. Kiel kutime ankaŭ neesperantistoj povis fine kunkanti kristnaskajn karolojn kaj sekve rigardi malgrandan ekspozi-

cion de Esperanto-libroj. La aranĝon denove partoprenis ankaŭ direktoro de la biblioteko, al kiu la klubo "La Ponto" donacis plurajn librojn kaj KDon por la biblioteka kolekto.

En la posttagmeza programo en eksĉevalejo de la urba paroĥejo denove ligiĝis kristanaj kaj popolaj kristnaskaj tradicioj kun bunta muzikumado. Ĉi-jare estis denove menciita ankaŭ Zamenhof-Tago pere de ne tro konata letero de d-ro Zamenhof al d-ro Michaux pri liaj malfacilaj profesiaj komencoj.

En poezia angulo M. Smyčka deklamis Kristnaskan Vigilion de Erben kaj s-ano Josef Kobza sukcese kontribuis per propra gitarludo kaj kantado. Fine partoprenantoj povis elprovi aŭguradon pere de verŝado de vakso. Plua kluba kunveno realiĝis la 18-an de februaro okaze de naskiĝtaga solenaĵo la klubanino Marie Dvořáková kaj estis ligita kun vizito de prelego de la Akademio Prácheň pri pensmaniero de la kamparanoj en la regiono en la 19-a jarcento. La jarkunveno kun akompana turisma/ kultura programo por gastoj okazos plej verŝajne je 4.4. aŭ 5.4. Detaloj estas preparataj, dezirantoj pri partopreno bv. informiĝi ĉe pisek@esperanto.cz aŭ 774 942 424.

*Pavla Dvořáková*



fotoj Jaroslava Malá

Ni invitas vin el kore al

## la 39-a LINGVA SEMINARIO kaj la 9-a SABLĀ PRINTEMPO

ekde la 12-a ĝis la 18-a de majo 2014 en familia pensio ESPERO en Skokovy (Bohemia Paradizo)

Antaŭtagmeze (nedevige) Esperanto-konversacio en du grupoj, posttagmeze manlabora ateliero, promenoj kaj ekskursoj al belega ĉirkaŭaĵo k.a. Vespere prelegoj, diskutoj, ludoj, projekciado, kantado, bivakfajro k.s.

Trafikatingebleco: trajno Praha-Turnov aŭ Pardubice-Turnov, de tie al Loukov u Mnichova Hradiště kaj sekve buso al Žehrov; aŭ buso al Žďár (el Mnichovo Hradiště aŭ Mladá Boleslav). Eblas veni ev. ankaŭ por malpli da tagoj, tamen pro organizaj kialoj estos preferataj partoprenantoj por almenaŭ 4 tagoj.

Loĝado en 2-3-, maks. 4-litaj ĉambroj, lavujo enĉambre, duŝejoj kaj necesejoj surkoridore. Prezo potage 420,- Kč (tranokto + 3 manĝoj) + kontribuo al organizaj/programaj elspezoj (100,- ĝis 200,- laŭ nombro de restadtagoj).

Kadre de la seminario Sabla Printempo, ĉi-foje denove pri "VOĈREGISTRADO" okazos: vespera prezento "Aktualaĵoj pri Esperanto en Interreto kaj laboro kun la sonprogramoj" (ĵaŭde 15.5.) kaj trejnseminario "Malkovru vian voĉon" (vendrede 16.5. antaŭtagmeze). Laŭinterese ĉiutage (kutime antaŭtagmeze) okazos paralele kun la lingvokursoj individua laboro kun interesitoj (50 minutoj popersone) – laboro en la programo Audacity kaj registrado de la elektita voĉlegita E-teksto. La programo taŭgas kaj por teknikaj komencantoj, kaj por progresintoj. La programon pri-

zorgos Pavla Dvořáková kaj la asistantoj. Aliĝintoj povas partopreni programon de ambaŭ aranĝoj!

Loĝado en 2-4-litaj ĉambroj, prezo potage 420,- CZK (tranokto + 3 manĝoj) + kontribuo al organizaj/programaj elspezoj (100,- ĝis 200,- laŭ nombro de restadtagoj).

Limdato por aliĝo: 30.4., poste kun krompago 50,-Kč. Pago surloke.

Info pri Lingva Seminario kaj aliĝiloj por loĝado kaj manĝoj:

Jindřiška Drahotová, Sadová 745/36, 293 01 Mladá Boleslav,

tel. (+420) 720 652 320,  
drahotova@esperanto.cz

Info pri programo de Sabla Printempo:  
Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. (+ 420) 774 942424,  
pisek@esperanto.cz

## Poděkování

Český esperantský svaz chce touto cestou poděkovat manželům Anně a Jirkovi Vyšínkovým z Vracova za bezplatné poskytnutí prostorů pro Libroservo a zajištění prodeje knih. Manželé Vyšínkovi se více jak 10 let starali o Libroservo a svazu tak ušetřili nemalé prostředky za nájemné, které musel svaz dříve platit.

Libroservo je v současné době přestěhované do Svitav. Proto veškeré požadavky na koupi či zapůjčení knih směrujte na sídlo svazu: ČES, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy.

*Libuše Dvořáková*

## Tonkin kaj Maskerado en Prago

La 10-an de februaro 2014 en Prago estis solene baptita la libro de Tivadar Soros **Maskerado ĉirkaŭ la morto**, eldonita de KAVA-PECH en la ĉeĥa traduko de Jindřiška Drahotová.



*La baptantoj de la nova libro: Petr Kautský, Pavla Dvořáková, Petr Chrdle, Humphrey Tonkin kaj Jindřiška Drahotová*

Por la solenaĵo en la ĉambro de Unio de Tradukistoj kaj Interpretistoj venis el Usono prof. Humphrey Tonkin, la editoro de la libro, kiu en la unua programero prelegis anglalingve. Prezintis lin la sekretario de la Unio Petr Kautský, sed aŭskultis nur kelkaj personoj. Post la prelego la propran baptadon – jam ĉeĥlingvan kun ĉeĥa traduko de parolado de H. Tonkin, ĉi-foje en Esperanto – ĉeestis

ĉirkaŭ kvardek homoj, inter ili multaj esperantistoj.

Prof. Tonkin en sia prelego klarigis, ke la aŭtoro en 1956 fuĝis el la komunista Hungario al Usono kaj tie li priskribis siajn travivaĵojn, kiujn lia familio trasuferis dum dek monatoj de la nazia okupacio de Hungario. Li ankoraŭ ne sciis sufiĉe bone la anglan kaj hungare li ne volis verki, ĉar en Hungario oni ne eldonus libron de elmigrinto. Tial li elektis Esperanton. Prof. Tonkin tradukis la libron en la anglan, aperis tradukoj ankaŭ ĉina, germana, hungara, itala, rusa, turka kaj nun la ĉeĥa.

Laŭ propono de Petr Kautský la libro estis cirkuligita inter la ĉeestantoj kaj ĉiu ĝin karesis dezirante sukceson ĉe la legantoj.

Kompreneble, esperantistoj uzis okazon por interparoli kun prof. Tonkin pri diversaj temoj. En la apuda ĉambro oni povis fari aĉetojn en porokaza libroservo.

Post solena tosto kaj manĝeto esperantistoj foriris al Masaryk-stacidomo kiel gastoj de esperantistoj-fervojistoj en ilia kunvenejo.

*Miroslav Malovec  
Fotoj Luděk Neužil*

*La aŭskultantoj en la salono de la Unio de Tradukistoj kaj Interpretistoj*





La sekretario de la tradukista unio Petr Kautský bonvenigas la gastojn



Esperantistoj uzis okazon por peti subskribon de prof. H. Tonkin (Jindřich Košťálek)



La tradukintino Jindřiška Drahotová kun la editoro Humphrey Tonkin



La bapton de la libro akompanis riĉa libroservo



Pavla Dvořáková muzike kontribuis al la programo



Novan libron necesas karesi kaj deziri al ĝi sukceson ĉe la legantoj.

*fotoj Luděk Neužil*

## Dankon al la kunlaborantoj

La bapton de la lasta eldonita libro de mia eldonejo KAVA-PECH „*Maškaraĉa kolekto kolektita de smrti*“ fare de Tivadar Soros mi efektivigis kunlabore kun la Unio de la ĉefaj interpretistoj kaj tradukistoj JTP. Pri ĝi raportas alia artikolo de ĉi-tiu numero. Sed mi volus aldoni kelkajn dankesprimojn al oferemaj kolegoj, kiuj multe helpis al tiu evento, laŭ la ĝenerala eĥo tre sukcesa.

Estas klare, ke la ĉefa danko celas la plej gravajn rolulojn, sen kiuj la eldonprojekto ne povus realiĝi, nome la editoron de la verko Humphrey Tonkin kaj la tradukistinon Jindřiška Drahotová. Sed estas ankaŭ aliaj, al kiuj mi volas publike danki: Precipe al Pavla Dvořáková, kiu ne nur brile interpretis la paroladon de H. Tonkin dum la bapto, sed ankaŭ plezurigis la ĉeestantojn per sia kantado, de si mem gitarakompananta – iujn kongrue al la temo en la hebrea lingvo; ŝi eĉ sukcesis kunkantigi la plejparton de la ĉeestantoj.

Due, por mi estis nemalhavebla la helpo de la „portantoj“, ĉar ĝuste en tiu tempo mi suferis pro fortaj dorsodoloroj. Tiuj miaj anĝeloj estis Jindřich Košťálek kaj precipe Karel Votoček, kiu eĉ frumatene startis el Štětí al Dobřichovice por povi ŝargi mian aŭton per skatoloj plenaj de libroj. Sed tio ne estis lia unusola merito: ja estis li, kiu provlegis la verkon komparante ĝin kun la Esperanto-originalo. Tio ne estas nekredemo al la tradukistino, sed rutina eldonista ago. Kaj ne eblas forgesi nian poeton Jaroslav Krolupper, kiu rapide arte tradukis la rimaĵojn.

Multajn meritojn pri la agrabla medio havis mia vivokunulino Milada Broumová, kiu aranĝis kaj gvidis la porokazan

ekspozicion kaj libroservon kaj zorgis pri la refreŝigo de la ĉeestantoj. Kaj mi ne forgesu ankaŭ „Miropiron“ Miroslav Hruška, kiu agis kiel efika teknikisto.

Sed mia danko apartenas ankaŭ al George Soros, filo de la aŭtoro, kiu subtenis la eldonon per disponigo de senpaga kopirajto kaj krome per aĉeto de 250 ekzempleroj de la libro li malaltigis la riskon de malprofito. El tiuj libroj nur malmultajn ni sendis al li en Usonon, dum la reston ni disdoncas lianome al elektitaj ĉefaj bibliotekoj.

Antaŭ la lanĉo de la libro okazis prelego de Humphrey Tonkin en la angla por ĉefaj anglistoj, bedaŭrinde kun tre malabunda ĉeesto. Sed lia prelego en la angla originalo estas publicita en la retpaĝaro de JTP, kie povas kun ĝi konatiĝi eventualaj interesiĝantoj ĉe [http://www.jtpunion.org/spip/article.php?id\\_article=4009](http://www.jtpunion.org/spip/article.php?id_article=4009) (la ligilo plej malsupre). La traduko en Esperanto estas ĉe [www.esperanto.cz/](http://www.esperanto.cz/), pri la esperantigo mi dankas al Brian Moon.

*Petro Chrdle*

## Novaj libroj ĉe UEA

- Antologio Latina 5 (23,40 EUR)
- Matavulj: Bakonja frat-brn (12 EUR)
- Esposito: Dieca manĝmaniero (12 EUR)
- Voltaire: La franca jezuito kaj la ĉina imperiestro (3 EUR)
- Laskaso: Konciza raporto pri detruado de Indio (12,90 EUR)
- Striganova: Miraklo de unu momento (3 EUR)
- Ĝibrano: La Profeto (16,50 EUR)
- Grenier: La tirano, la liutfaristo kaj la tempo (12,90 EUR)
- Tradukoj el Marx, Engels kaj Lenin (religio, loĝejproblemo, revelacio, kapitalisma sklaveco k.s.) (po 5,70 EUR)



## Internacia Vintra Universitato

IVU estas la vintra ekvivalento de la Internacia Kongresa Universitato (IKU), kiu antaŭe nomiĝis Internacia Somera Universitato. Dum IKU okazas enkadre de Universalaj Kongresoj (UK), IVU trovis sian lokon enkadre de Internaciaj Festivaloj (IF). La unuaj du okazis en 2007 kaj 2008 en Düsseldorf, sekvis du sesioj en Nördlingen (2009-2010), poste en Xanten (2011) kaj Dortmund (2012). Ili estas samtempe studadesio de AIS kaj eblas tie ekzameniĝi kaj akiri AIS-atestojn.

La 7-a IVU enkadre de la 30-a IF okazis en Nördlingen (27.12.2013 – 4.1.2014) kun jenaj prelegoj: *Aŭroro – la nordia lumo* (A. Wandel), *Esperanto-informado en la interreta epoko* (A. Wandel), *Ĵurnalismo en Turkio – cenzuro sen cenzuristoj* (T. Bormann), *Krateroj, asteroidoj, meteoritoj* (B-R. Larue), *Novparolo – Retrospektive* (I. Fantom), *Slovakio: Modela lando de EU en interreta multlingva instruado* (J. Reinbart).

Al la festivalo aliĝis 122 homoj el 22 landoj.

## Vinilkosmo

eldonejo de kompaktaĵoj kun kantoj en Esperanto preparis novajn verkojn de Ĵomart kaj Nataŝa, de Mikaelo Bronŝtejn, I.D.C., Jonny M, La perdita generacio, Manuel kaj fine de Dominique Gautier. La tuta katalogo troviĝas ĉe: <http://www.vinilkosmo.com>

En la retejo krom la mendilo oni trovas ankaŭ fragmentojn por aŭskulti.

## Ludo RISKO

ĉe <http://edukado.net/ludoj/risko/reguloj> havas nun 149 ludantojn, kiuj per la ludo povas testi siajn sciojn kaj eĉ gajni libron.

## Kurso Etape

Ĉe [www.ilei-mondo.info](http://www.ilei-mondo.info) oni povas trovi ne nur novan retejon de ILEI, sed ankaŭ kurson **Esperanto kurso etape**, kiu proponas al lernantoj lernadon laŭ etapoj.

## Profesia televido en Esperanto

estas preparata por elsendi ekde marto 2014 el la aŭstralia Sidnejo, ĉirkaŭ du horojn semajne

<http://www.istreamstudios.tv/index.php/video/31/esperanto-campaign/>

Ni vidos, kiel la bona intenco funkcios.

## Verda Stacio

ĉe la retejo [www.stacio.eu](http://www.stacio.eu) jam funkcias dum pluraj jaroj kaj proponas filmetojn kaj sonregistraĵojn.

## Lingva anguleto

La ĉeĥa vorto **využit** estas tradukebla kiel **uzi** aŭ **fruktuzi** aŭ **utiligi**, simple utile uzi. Male la vorto **eluzi** signifas **vypotřebovat**, **vyčerpat**, per uzado komplete neniigi.

Se vi volas indiki ies aĝon, diru, ke li estas **30-jara** aŭ **30 jarojn aĝa**. Strangan hibridon *30-jaraĝa* ie-tie uzatan grandaj gramatikoj kaj vortaroj ne registras, ĉar ĝi estas ne estetika kaj gramatike duba. Komparu: *Kvinjaraĝa knabineto kun trijaraĝa frateto*. – *Kvinjara knabineto kun trijara frateto*.

## Programo 2014 de la franca Esperanto-kastelo Greziljono

**2014-apr-19/26:** FRINGOJ, renkonto inter grupoj de Esperanto-lernantoj kaj iliaj instruistoj.

**2014-apr-26/maj-04:** PRINTEMPaS, intensivaj kursoj en 3 niveloj, internaciaj KER-ekzamenoj B1-C1. [gresillon.org/printempo](http://gresillon.org/printempo)

**2014-maj-08/11:** Kantado de korusaro Interkant'

**2014-maj-11/17:** Renkonto de rememoroj inter malnovaj esperantistoj kaj iamaj gastoj de Greziljono, [gresillon.org/s1](http://gresillon.org/s1)

**2014-jun-29/jul-06:** Turisma semajno, tuttagaj ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro kaj rezidejoj de renesancaj artistoj, [gresillon.org/s2](http://gresillon.org/s2)

**2014-aŭg-01/09:** Sennacieca semajno kun kursoj, ekskursoj kaj prelegoj, antaŭ SAT-kongreso, [gresillon.org/s3](http://gresillon.org/s3)

**2014-aŭg-09/17:** Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj, SAT-Infankongreseto, [gresillon.org/s4](http://gresillon.org/s4)

**2014-okt-24/nov-01:** AŬTUNE, la komunaj ferioj por infanoj, familioj kaj geavoj.



**Adreso:** MCE, Grésillon, St. Martin d'Arce, 49150 BAUGE-EN-ANJOU, France

**Telefono:** 02.41.89.10.34

**Retpoŝto:** [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

**Retejo:** [gresillon.org](http://gresillon.org)

## Por vojaĝemuloj

En la retejo <http://vojagxo.info> oni trovas esperantlingvajn ekskursojn al diversaj mondopartoj, ekz. Somera tendaro de vojaĝantoj apud Moskvo (6.-9.6.2014), Internacia forumo „Segmaŝino“ en Rusio (25.-27.7.), Busvojaĝo tra kvar landoj de Suda Ameriko + UK Bonaero (17.7. – 20.8.), Nekonata Ĉinio (10.-20.8.), Piedmarŝo al Everesto (6.10.).

La **Internacia klubo „Esperantotur“** (str. M.Sklodowskiej-Curie 10, PL 85-094



Bydgoszcz, Pollando) prezentas sian **Turisman kalendaron por 2014.**

Temas pri preskaŭ 60 ekskursoj, inkluzive al UK Buenos Aires. Inter la vizitotaj landoj estas Bulgario, Francio, Hispanio, Italio, Pollando, Rusio, Usono, Kanado, Alasko, Kubo, Meksikio, Suda Ameriko, Ĉinio, Nepalo, Franca Polinezio, Japanio, Aŭstralio, Novzelando, Singapuro, Paska Insulo.

Detalan kalendaron petu ĉe la adreso: [info@esperanto.bydgoszcz.eu](mailto:info@esperanto.bydgoszcz.eu), telefone: (+48 052)3461151.

## Seminario pri AMO



AMO (Aktivula Maturiĝo) de UEA okazos de la 22-a ĝis la 24-a de marto, 2014 en Horány, en apudrivera centro sur insulo en Danubo ĉ. 40 km. de Budapeŝto. La temo **Kiel komuniki efike?** estos traktata en pluraj sesioj (*Kiel organizi lokajn grupojn, Kiel provizi kialojn por lerni Esperanton, Kiel prepari gazetarkomunikojn, Modernaj komunikaj rimedoj, Kiel labori internacie*).

Ĝi okazos samtempe kun Junulara Esperanto-Renkontiĝo, tial oni trovas detalojn kaj aliĝilojn ĉe <http://www.jer.hu/>.

# Raporto de la Internacia Virina Tago 2014 Hiroŝima

Estimataj gesinjoroj, karaj geamikoj,

Por la Internacia Virina Tago de UN la kunvenon ni havis en la 2-a de marto ĉe la Centro de Komuna Partopreno de Geviroj en la Socio de la urbo Hiroŝima. Sub la temo “Infanoj de Fukuŝimo tri jarojn post la katastrofo” plejparte virinaj aktivuloj el diversaj organizoj de la gubernio kaj la urbo Hiroŝimo kunvenis plenplene en la halo.

En la malfermo la prezidanto klarigis pri la internacia interŝanĝo de mesaĝoj, kaj s-ino OSIOKA Taeko laŭte legis unu mesaĝon el 234 alvenintaj el 61 landoj kaj teritorioj antaŭ la urbestro, la preleganto, kaj pli ol 150 ĉeestantoj kiuj havis presitan programon kun plejparto da mesaĝoj ricevataj nur per Esperanto.

Por la temo de la tago vicprofesoro de universitato de Fukuŝimo unue en sia prelego opiniis ke la mesaĝoj el tiom multaj landoj mencias pri Hiroŝimo-Nagasako-Fukuŝimo, kaj tiel homoj en la mondo hodiaŭ vidas kio okazis kaj okazas en Fukuŝimo. La ekspozicio de la mesaĝoj ĉe la Centro daŭris ĝis la 8-a de marto.

*S-ino YOSIDA Mariko, Prez. de la  
Plenuma Komitato de la Virina Tago  
2014. Hiroŝima*

**46-a Tutlanda Fervoja Amika  
Esperanto-Renkontiĝo**  
11-13 julio 2014 (vendredo - dimanĉo)  
Győr, Széchenyi Universitato,  
Egyetem tér 1.

# Vivtragedio de Zamenhof 1914

La 26-an de julio 1914 devis okazi en Parizo jam la 10-a Universala kongreso de la lingvo Esperanto. Por ĝi aliĝis 3.739 esperantistoj el la tuta mondo. Sed ĝuste en tiu ĉi tago eksplodis la unua mondmilito, pro kio tiu ĉi kongreso ne povis okazi.

Por Zamenhof tio estis vivtragedio, ĉar li subite devis ĉesigi sian aktivadon por sia vivmisio. Tamen li ne rezignis. Malgraŭ sia grava kormalsano, li baldaŭ komencis prilaboradi novajn konceptojn por plibonigado de la aferoj tuthomaraj, realigotajn post tiu ĉi terura mondmilito.

Li estis konvinkita, ke ĝia unua, tiucela parto – la lingvo Esperanto, ebligonta bazan unuecon en diversecoj lingvaj – havas jam firman fundamenton kaj tial en la tuta mondo plue disvastiĝados. Tial li sentis necese plene koncentri sian strebadon, por kreado de la necesa, dua parto: kreado de la unueco en diversecoj religiaj kaj etikaj.

Tiucele li faris preparojn por kunvoki – tuj post la milito – kongreson por neŭtrala, tuthomara religia fundamento, univertsale akceptebla. Li aplikis en ĝin eĉ la ĉefajn ideojn el siaj Hilelismo kaj Homaranismo. Komplekse li celis: starigi neŭtrale homan, etikan regularon, kiu kapablu fari „el homoj homojn“. Ĝia ĉefa maksimumo, rekonata en ĉiuj religioj, devus esti: „Agu kun aliuloj tiel, kiel vi deziras, ke ili agu kun vi!“ El ĝi eblas ja dedukti la maksimumojn ceterajn.

-jk-

Rimarkigo: Pri homaranismo de Zamenhof aperis kvarpaĝa artikolo en religia revuo Dingir 1/2014, <http://dingir.cz/>.

## Tutmonda Konferenco pri Instruado de Esperanto

Invito iros de ŝtato al ĉiuj ŝtatoj de la mondo. Ĉar en Svislando niaj kantonoj estas ŝtatoj, mi iris al la kantona registaro de Neuchâtel kaj petis, ke la kantono invitu. Kaj la registaro konsentis per decido je la 20-a de novembro 2013. En la kantono Neuchâtel troviĝas la ĉefurbo Neuchâtel kaj la urbo La Chaux-de-Fonds, kie troviĝas CDELI, grava arkivejo pri planlingvoj. En tiuj du urboj okazos la kolokvo. (En la franca: Conférence, en Esperanto kolokvo, ĉar ILEI okazigas ĉiujare konferencon) La datoj estas **13-a ĝis 16-a de majo 2015**, (Ĵaude la 14-an de majo estas kristana festo kaj feritago) do en la fama jubilea jaro UNESKO-Montevideo 60. La kantona registaro donacos la luon de la universitata aŭlo kaj la aperitivan de la malferma ceremonio. La aŭlo en Neuchâtel kaj la ĉambroj en la urba biblioteko en La Chaux-de-Fonds estas formale rezervitaj.

La unua tia konferenco okazis en Ĝenevo en 1922, la dua en Prago en 1927. Estos la tria.

La registaro de la kantono do konsentas inviti ĉiujn registarojn de la mondo sendi iun delegacion al tiu kolokvo. Tio signifas, ke en ĉiu ŝtato de la mondo venos al la registaro la invitletero (en marto aŭ aprilo 2014). Do la registaro devos esplori, informiĝi, ĉu Esperanto estas instruata sur ĝia teritorio. Tio estas la pozitiva afero en tiu kolokvo, fakte eble pli ol la konferenco mem.

ILEI estas la organizanto. Ĉe ILEI okazis estrara voĉdonado, la okazigo de tiu evento estis aprobita. Kompreneble

ekos kunlaboro kun Svisa Esperanto-Societo SES, kies kun-prezidanto mi estas. UEA dece devus kontribui.

Lingva aspekto: Ni laboros kiel ILEI faris en Kopenhago en 2011: se la prelego estos en la franca, la projekciita teksto sur ekrano aperos en Esperanto kaj inverse. Ni akceptos tamen kontribuojn en jenaj lingvoj: germana (de), itala (it) kaj angla (en), kaj antaŭvidos interpretadon. La germana kaj itala lingvoj estas oficialaj lingvoj en Svislando.

**Celoj:** Kolekti prezenton de la nuntempaj metodoj uzataj por lerni. Kolekti prezenton de la nuntempaj metodoj uzataj por instrui. Kolekti rezultojn kaj observojn pri konsekvencoj de la lernado de Esperanto (lernhelpa efiko). Kolekti rezultojn kaj observojn pri konsekvencoj de la lernado de Esperanto (en la kampoj de psikologio, akiro de interkulturaj kapabloj, solidareco, toleremo). Interŝanĝo de spertoj. Renkontiĝo kun lokaj fakuloj

**Programskizo:** Peter Baláž: *lerni per la Reto*, François Grin: *loko de Esperanto, ebloj de Esperanto*, François Grosjean: *denaskuloj, akiro de lingvo*, Mireille Grosjean: *lernhelpa efiko de Eo*, Mireille Grosjean: *kiel neeŭropanoj lernas Esperanton*, Andres Kristol: *bazaj konsideroj pri lingvoj kaj dialektoj*, Zsófia Kóródy: *Esperanto-Centroj, partneradoj*, Ilona Koutny: *Esperanto en universitatoj*, Katalin Kováts: *pri [edukado.net](http://edukado.net)*, Mónika Molnár: *pri spertoj en La Granda Ursino*, Angela Tellier: *pri springboard to languages*.

**Kontakto:** Mireille Grosjean, Grand-Rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets  
+41 79 69 709 66, +41 32 932 18 88  
<http://mirejo3.blogspot.com>


# Kluba vivo

**Brno:** Jarkunveno la 5-an de februaro 2014 bilancis la laboron en 2013.



La plej grandaj atingoj de esperantistoj el Brno estis libroj (*Frazeologia vortaro de Cink*, *Historiaj ĉevroj*, *Arne, syn náčelníka*, *Moje matka – Mia patrino*), apero en amaskomunikiloj (*televideo Ostrava*, *radio Brno*), instruado ĉe Masaryk-universitato (*kursoj de Esperanto kaj interlingvistiko*), kvardeko da klubaj prelegoj, aktiva partopreno en aranĝoj (*Sanremo*, *Partizánské*, *Lančov*, *Svitavy*, *Nymburk*).

La 18-an de januaro 2014 la klubanoj estis invititaj al bapto de nova prelegaro de rusa minoritato en Moravio, en kiu estas ankaŭ prelego de M. Turková *Rusistoj, rusoj kaj esperantistoj*.



**Česká Třebová:** La 28-an de decembro 2013 la membroj de la klubo Amikeco organizis Silvestron kun temo pri manĝoj de la praepoko ĝis nun. 45 personoj el 15 lokoj konkursis en kvizoj,

kantis kaj dancis laŭ muziko de s-ro Slavíček, alportis manĝaĵojn el diversaj epokoj kaj noktomeze disdonis donacojn.

**Pelhřimov:** E-klubo Montetaro en Pelhřimov gratulas al sia membrino Hana Pospíchalová, kiu finis la studadon de pedagogio je la universitato en Prešov kaj ricevis titolon "Doktoro pri pedagogio". Ŝia doktoriga laboro nomiĝis "Internacia lingvo Esperanto en lingvistiko, pedagogio kaj eklezio".

**Prostějov:** La 6-an de februaro 2014 okazis jarkunveno, kiu elektis komitaton: Jaroslav Liška (prezidanto), Milan Smělý (bibliotekisto), Jiří Kincl (kasisto), Bedřiška Kaštilová (reviziisto), Božena Danišová (komitatano).



La klubo sukcesis publikigi plurajn artikolojn en loka gazetaro (ekz. *Membroj de E-klubo adiaŭis la malnovan jaron*, *Mi lernis Esperanton dum du horoj*). Silvestron en la klubejo partoprenis ankaŭ gastoj el Olomouc kaj Přerov.



**Přerov:** La 11-an de decembro 2013 en restoracio de bierfarejo (restoracioj volonte helpas al kluboj, kiuj ne havas propran klubejon) okazis antaŭkristnaska renkontiĝo de 30 esperantistoj el Přerov kaj ĉirkaŭaĵo (Hranice, Olomouc, Prostějov). Venis ankaŭ reprezentanto de la magistrato ing. D. Novotná.



Violonisto Jan Duda kun akordeonisto Václav Nosek sekurigis gajan etoson. Loka entrepreno GAMBRO donacis suvenirojn en formo de ceramiko kun bildo de kastelo Přerov. Rememoro estis dediĉita al niaj forpasintoj.

**Svitavy:** La 9-an de januaro 2014 okazis en Esperanto-Muzeo prelego pri Moneroj de la mondo. La 23-an de januaro prelegis Petr Zobač pri vojaĝado tra skota montareto (vidu bildon).



La 28-an de februaro Libor Lněnička prelegis pri vizito kaj vivo en Japanujo.

De la 7-a de marto ĝis 9-a de marto en Svitavy okazis CENTREJO – Centra Eŭropa Najbara Trejnaktivula Renkontiĝo de Esperantistaj Junularaj Organizaĵoj.

Por la 22-a de marto la klubo preparas tabulajn ludojn por infanoj kaj plenkreskuloj.


La 26-an de aprilo 2014 okazos tradicia regiona renkontiĝo en la urbo Litomyšl (faka ekskurso al la nova maŝinindustria entrepreno CIMBRIA kaj al la t.n. Nova preĝejo de la Eklezio de Bohemaj fratoj, konstruita en 2008–2010). Por septembro la klubo preparas filatelan ekspozicion.

**Vítkovice:** La kluba jarkunveno en Ostrava-Vítkovice okazis la 14-an de februaro 2014.



Gravaj atingoj de la klubo estis lernejo kaj balo en Bartošovice, agado de Verda Stacio (filmoj pri restarigo de monumento en skolta centro de Kopřivnice kaj pri datreveno de Esperanto-muzeo en Svitavy). La klubanoj scias ankaŭ sin amuzi (ovofritaĵo en Frýdlant, projekciado de filmoj en Poruba) kaj partoprenas aranĝojn (Nymburk, Ĉantoryja, SES en Martin, Viena Agotago de Verda Stacio, renkonto en Gliwice).

**Mladá Boleslav:** Jindřiška Drahotová partoprenis en Konkurso de Verkado de la reĉta revuo *El Popola Ĉinio* 2013 kaj ricevis trian premion por la



rakonto **Viva rememoro** (pri hundo):

[http://www.espero.com.cn/se/txt/2013-06/21/content\\_550732.htm](http://www.espero.com.cn/se/txt/2013-06/21/content_550732.htm).

**Prago:** Jarkunveno la 27-an de februaro 2014 elektis novan komitaton: Tomáš Břicháček (prezidanto kaj redaktoro de bulteno), Jiří Mišurec (vicprezidanto kaj ekonomiisto), Vlasta Piščíková, Vít Guiglielmo Mišurec, Jan Šebetovský, Pavla Zemanová, Jiří Patera (komitatanoj). La kunvenoj okazas ĵaŭde je la 17 h. Per minuto da silento oni honoris la forpasintojn (prof. Jiří Harcuba, Helena Maudrová, Eva Hoffmannová, Ing. Jan Šafr, Karel Bartošík, Ing. Čestmír Vidman).

**Ĉeská Třebová:** Jarkunveno la 26-an de februaro 2014 en saloneto de Starmon bilancis la pasintan jaron. La kunvenoj okazas unufoje monate en vestejo de Kulturcentro. Pri luprenita vitrino en la urbo zorgas alterne ĉiuj klubanoj.



Jana Křížková, Hana Kyllarová kaj Karel Čada prelegis pri Esperanto en la Akademio de Libera Tempo en

Žamberk. Estas planite viziti ekspozicion en Lanškroun (Ĉu Esperanto estas morta lingvo?). Same kolektadi poŝtmarkojn por helpi malriĉulojn en Afriko. Post la jarkunveno ni spektis filmon pri komenco de la fervojo.

**Pardubice:** La klubo kunlabore kun AEH en 2013 preparis 37 kunvenojn, eldonis ĉiumonate *Informilon* kaj kvaronjare *Antaŭen*, sendatajn al 160 adresoj en 17 landoj. Post naŭmonata traktado kun la magistrato eblis instali informkeston sur la muro apud granda bakaĵvendejo Hrubý (avenuo de Paco). Fine de junio 2013 realiĝis buskaravano al Herzberg, la Esperanto-urbo. Preparata estas broŝuro pri la unua ĉeĥa esperantisto F. V. Lorenz. La 14-an de junio okazos en Pardubice Esperantotago. AEH kunorganizas la printempajn kaj aŭtunajn lingvajn seminariojn en Skokovy.

**Plzeň:** Sabate la 15-an de marto la klubo okazigas Regionan Okcidentbohemian Renkontiĝon kun inaŭguro de la ekspozicio „Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“, tagmanĝo en restoracio de la hotelo Slovan, ekskurso al Bierfara muzeo kaj subterejo de la urbo.

**Litomyšl:** La klubo de Esperanto-Amikoj en Svitavy invitas al Renkontiĝo en Litomišlo la 26-an de aprilo 2014. Je la 9-a h vizito de maŝinfabrika Cimbria, post tagmanĝo vizito de nove rekonstruita templo Trovo de S-ta Kruco. En la urbo estos inaŭgurita la nova bankuraca sezono per veturo de veteran-aŭtoj tra la kolonaro kaj per kultura programo kun famaj aktoroj Zdeněk Svěrák kaj Vojta Kotek. Info: [dvor.libuse@seznam.cz](mailto:dvor.libuse@seznam.cz).

Karel Čapek

## Interparoloj kun T.G.M.

(TGM – Tomáš Garrigue Masaryk)

### MALJUNA ARBO

Rigardu la maljunan kverkon; laŭdire ĝi estas naŭcentjara, tamen, kiel forta ĝi estas, kiom da vivo estas en ĝi! Nek grandeco nek maljuneco obstaklas al ĝi kreskigi novajn foliojn kaj flori.

La homo devus esti simile maljuniĝanta. Ĝisvivi cent jarojn, tio ne devus esti ia lertaĵo – kompreneble, per tiuj artefaritaj, kontraŭnaturaj rimedoj oni ne atingos tion. Kreski en freŝa aero kaj sub la suno, racie manĝi kaj trinki, vivi laŭetike, labori per la muskoloj, per la koro, per la cerbo, havi zorgojn, havi celon – jen la tuta recepto makrobiotika.

Kaj ne perdi vivan intereson: ĉar intereso, jen ĝuste la vivo mem, sen intereso kaj amo la vivo ne ekzistas.

Ni tro taksas la vivon de unu vidpunkto: laŭ ties longeco, kaj ne laŭ ties grandeco. Ni pli multe cerbumas pri tio, kiel la vivon plilongigi, ol pri tio, kiel ĝin vere plenigi.

Multaj homoj timas la morton, sed neniom gravas por ili, ke ili mem kaj tiomaj aliaj vivas fakte nur duonvicon, sen enhavo, sen amo, sen ĝojo.

En ekkono de vero, en etika ordo, en efika amo ni jam en ĉi tiu vivo partoprenas la eternecon – ni plilongigas nian vivon ne je tagoj aŭ jaroj, sed je la eterno.

Estas bone, ke ni penas plilongigi homan vivon; tamen plie ni valorigu ĝin.

Iam-tiam revenas al mi sonĝo, mi ne scias, de kie ĝi aperis, eble el ia bildo: ŝipo sur la maro kaj super ĝi kliniĝas

anĝelo kun horloĝo; de tempo al tempo defluas el la horloĝo guto en la maron kaj la anĝelo diras: Denove unu minuto pasis.

La sonĝon mi ĉiam konsideras averto: Aktivu, laboru, dum viaj minutoj pasas.

Multaj homoj maljuniĝas nur pro komfortemo, ĉar ili ne plu volas ion fari. Ne maljuniĝadi, tio ne estas nur konservi sin, sed ĉiam kreski, ĉiam akiradi; ĉiu jaro estu, kvazaŭ la homo ascendus sureskale pluan ŝtupon.

*Esperantigis Vladimír Türk*



Publike prezentis Miroslav Smyčka 27.10.2013 kadre de la kultura vespero dum la ĈEA-Konferenco en Nymburk. Sonregistraĵo de la teksto senpage aŭskulteblas en:

<http://www.ipernity.com/doc/181031/27753625>



# KOMENIUS - ZAMENHOF

## La Vojo al Harmonio

*Jaroslav Karhan (daŭrigo)*

Sian lingvan verkon, kiun Zamenhof noble, senprofite donacis al la tuta homaro, li rigardis kiel gravan, sed nur la unuan ŝtupon al tiu celo. Kaj nune li komencis intense prilaboradi – enkadre de sia kompleksa vojo al la tuthomara harmonio – la ŝtupon duan:

Unuecan, religie-etikan bazon en universala formo, kiu ne anstataŭus la ekzistantajn religiojn, analoge kiel Esperanto ne anstataŭas la ekzistantajn lingvojn. Ĝi estus nur ilia komuna kerno, akceptebla por **ĉiuj** homoj, por akordiĝo de la reciprokaj interhomaj kaj internaciaj rilatoj.

Dum tiu ĉi sia laboro li konstante pense revenis en sian naskiĝurbon Bjalistoko, kie – kiel en lenso – koncentriĝadis la grava problemaro de la tuta mondo, precipe ankaŭ la religia. Nome, grandparte estis: rusoj – ortodoksuloj, poloj – katolikoj, germanoj – luteranoj kaj hebreaĵoj – judoj.

Tiu diverseco de la religia kredo pligrandigadis malamikecon inter tiuj grupiĝoj de la loĝantaro. Fakte tio estis diverseco de dogmoj, kiu disigadis... Nome, inter ilia amaso tute perdiĝis la elementa, komuna kerno de kredo, kiu – kaŭze de tio – ne povis en la homaj koroj ekĝermi, ekflori kaj maturiĝi per harmoniigaj fruktoj.

Tiuj junaĝaj travivaĵoj de Zamenhof konfirmis lian konvinkon, ke necesas – en amasoj de dogmoj de ĉiuj religioj – elserĉi ĝuste tiun komunan kernon de kredo, universale akcepteblan, kiu devas

esti de **ĉiuj** homoj rekonita kiel deviga, natura, kosme-etika bazo de la vivo.

Nur poste ĝi povas esti ornamita per plej diversaj dogmoj de unuopaj religioj, analoge kiel kadroj ĉirkaŭas kaj plibeligas la bildon. Sed la fakan valoron ĉiam devas havi la bildo, ne ĝia kadro, eĉ se ĝi estus ege artefarita kaj valora.

Dum tiu ĉi serĉado inspiris lin la palestina saĝulo Hillel, samtempulo de Kristo, kiu eldiris tiun ĉi maksimumon: «Ordono de Dio mem estas nur tio, kio estas enskribita en la koro de **ĉiu** homo kaj kio tial estas komuna al ĉiuj religioj. Ĉio alia en la religioj estas nur ordonoj de homoj; sekve sen peko kontraŭ Dio ĉiuj religiaj eksteriĝoj povas ŝanĝiĝi kaj kunfandiĝi per reciproka interkonsento de homoj.

Kiam tiu ĉi ideo estos akceptita, tiam la eternaj religiaj muroj inter la homoj falos kaj kunfandiĝo de la homaro fariĝos afero plenumbla.»

Plue Hillel proklamis: «La tuta esenco de la religio estas la leĝo: agu kun aliuloj, kiel vi volas, ke oni agu kun vi; ĉio alia estas nur komentario.»

Tiujn ideojn de Hillel akceptis Zamenhof kiel bazon por sia universala, religie-etika koncepto, kiun li tial origine nomis «hillelismo». Poste li ankoraŭ plue prilaboris ĝin, donis la nepersonan, esperantlingvan titolon «homaranismo» kaj eldonis en formo de broŝureto en 1906. En ĝi li i.a. proklamis:

«La homaranismo estas celado al pura homeco kaj absoluta intergenta justeco kaj egaleco... Ĝi estas instruo, kiu, ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religia anaro, donas al li eblon eviti ĉian malverecon kaj kontraŭparolojn en siaj nacia-religiaj principoj kaj komunikiĝadi

kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamento neŭtrale homa, sur principoj de reciproka frateco kaj justeco.

La homaranoj (t.e. membroj de la ĉiuhoma familio) estas konvinkitaj, ke ili staras sur fundamento de **absoluta** vero, kiu pli aŭ malpli frue **devos** venki, kiel ajn longe la mondo batalus kontraŭ ĝi, ke ĉiu nacia aŭ religia ŝovinismo kaj ĉiu celado de unu gento regi super aliaj gentoj, kiel bazita sur malvero kaj rajto de pugno, pli aŭ malpli frue devos malaperi; ke la homaranismo, bazita ne sur tempaj politikaj kondiĉoj de la vivo de tiu aŭ alia gento, ne sur variaj religiaj dogmoj, ne sur tempaj modaj doktrinoj kaj fluoj, sed sur vero **absoluta, ĉiuloka** kaj **ĉiutempa**, estas la **sola** politike-religia idealo, kiun povos havi la estonta homaro, la sola idealo, kiun ĉiu patro kun pura konscienco povas transdoni al siaj infanoj sen timo, ke ŝanĝiĝantaj kondiĉoj de la vivo elŝiros tiun ĉi idealon el ilia brusto kaj lasos ilin, en la mezo de la vojo de l' vivo, sen ia programo kaj spirita apogo, kiel faris kun ni diversaj malverfundamentaj idealoj, transdonitaj al ni de niaj prapatroj...

Homarano direktiĝas laŭ jenaj, ĉefaj principoj:

Mi estas homo kaj por mi ekzistas nur idealoj pure homaj... Mi kredas, ke ĉiuj popoloj estas egalaj kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj, sedne laŭ lia deveno...

Mi kredas, ke en sia familia vivo ĉiu homo havas plenan, naturan kaj ne-disputeblan rajton, paroli kiun lingvon li volas kaj konfesi kiun religion li volas, sed en komunikiĝado kun homoj de alia deveno, li devas, kiom ĝi eblas, uzadi lingvon neŭtrale-homan kaj vivi laŭ principoj de religio neŭtrale-homa.

Kia ajn estas mia religio, mi konfesas ĝin laŭ la neŭtrale-homaj principoj «hohomaranaj», kiuj konsistas i.a. el jeno:

a) La plej altan, por mi nekompreneblan Forton, kiu estas kaŭzo de la kaŭzoj en la mondo materia kaj morala, mi povas nomi per la nomo «Dio» aŭ per alia nomo, sed mi konscias, ke la esencon de tiu ĉi Forto ĉiu havas rajton prezenti al si tiel, kiel diktas al li lia prudento kaj koro aŭ instruoj de lia religio. Neniam mi devas malami aŭ persekuti iun pro tio, ke lia kredo pri Dio estas alia ol mia.

b) Mi konscias, ke la esenco de la veraj religiaj ordonoj kuŝas en la koro de **ĉiu** homo sub la nomo de Konscienco kaj ke la ĉefa – por ĉiuj homoj deviga – principo de tiuj ĉi ordonoj estas: agu kun aliaj tiel, kiel vi deziras, ke aliaj agu kun vi, kaj aŭskultu ĉiam la voĉon de via Konscienco.

c) Eĉ se mi oficiale estas ano de neniu religio, mi akceptas tiun ĉi bazan konfeson, kiel mian vivprincipon. Kiam en mia urbo estos fondita templo homarana, mi devas kiel eble plej ofte vizitadi ĝin, por frate kunvenadi tie kun homaranoj de aliaj regionoj... por aŭskultadi la verkojn de la grandaj instruistoj de la homaro...»

Tio estas la religia esenco de la Zamenhofa projekto homaranismo, kiu praktike – en pli granda amplekso – ne efektiviĝis. Ĝiaj ideoj kaj instigoj – laŭ propra esprimo de Zamenhof – restis «voĉo vokanta en dezerto». Lia epoko ja ankoraŭ ne maturiĝis por ilia globala efektiviĝo...

*(daŭrigota)*

# Jubileoj

Komence de la jaro 2014 atingas sian jubileon pluraj famaj esperantistoj.

La 17-an de januaro 2014 festis sian 85-jariĝon honora membro de ĈEA **Vladimír Herman**. En junaĝo li estis fervora esperantista radio-amatoro, kiu interŝanĝis kun eksterlandaj radio-amatoraj esperantistoj multajn QSL-kartojn, presitajn esperantlingve (kiam du radio-amatoroj sukcese ligas kontakton, ili sendas al si reciproke tiujn kartojn por konfirmi, ke la kontakto efektive okazis). En plenkreskeco li atingis la plej altan politikan funkcion en la sudmoravia regiono kaj kvankam li mem ne havis plu tempon dediĉi sin al la internacia lingvo, pri esperantistaj amikoj li ne forgesis. Dank' al li la Somera Esperanto-Tendaro en Lančov ricevis dufoje subvencion de 100 mil kronoj. La unua subvencio ebligis konstrui la ĉefan kabanegon kun kancelario, manĝejo kaj kuirejo, la dua estis uzita por aĉeti kabanajn, kiam estis malpermesitaj tendoj sur la bordo de la digolago (pro higienaj motivoj).


Dek jarojn pli juna estas **Jarmila Čejková** el Frýdek-Místek, kiu festas sian naskiĝtagon la 1-an de januaro.



Dum pluraj jaroj ŝi zorgas pri la kolektado de gazetaraj eltranĉaĵoj kun esperantisma temo. Ŝi metas ilin zorge en grandan albumon, kiun oni povas legi dum la asociaj aranĝoj aŭ en la muzeo. Ŝi estas aktiva en la loka klubo, plurfoje ŝi helpis en Lančov. Ŝi esperantistiĝis en Brno, partoprenis la aranĝojn de loka junularo,

post edziniĝo ŝi transloĝiĝis al Frýdek-Místek, kie ŝi kunlaboris kun Marie Bartovská.

La 9-an de januaro 2014 atingis sian 75-jariĝon **Oldřich Kníchal**, iama redaktoro de Starto kaj eminenta tradukisto. Ĝis nun estas uzataj liaj informiloj *Co nevíte o Esperantu* (Kion vi ne scias



pri Esperanto, 1968) kaj *Světadíl bez tlumočnicků* (Mondoparto sen interpretistoj, 1978). Kun V. Novobilský li verkis broŝuron *Komenio kaj la internacia lingvo* (1974), kun E.

Seemannová kaj A. Staňura li esperantigis historion de Ĉeĥoslovakio *Meze de Eŭropo* (1980). Li tradukis el Hašek, Olbracht, Vančura, Majerová k.a. Fragmentoj el liaj tradukoj aperis en Panoramo 1980 – *Mediteme* (el ĝi nia foto). En 1979 li edziĝis al Eva Tófalvi kaj ekloĝis en Budapeŝto. Kun ŝi li verkis originalan romanon *Kiuj semas plorante*. Li verkis plurajn verkojn en la ĉeĥa kaj slovaka lingvoj, enslovakigas hungarajn aŭtorojn.

La 9-an de marto 2014 **Karel Votoček** fariĝis 65-jara, laŭ profesio li estas termesuristo. Pri sia fako li prelegis en




KAEST 2008 (*La plej precizaj geodeziaj laboroj*). Li nun helpas kontrollegi presotajn verkojn (*Ĉeĥa-esperanta frazeologia vortaro* de Josef Cink) aŭ ciferecigatajn

tekstojn en la grupo de ĈEA por ciferecigado.

## Miloslav Pastrňák

(1919-2014)

La 31-an de januaro 2014 forpasis **Miloslav Pastrňák** (94-jara) el EK



Haviřov, honora membro de ĈEA. Li naskiĝis 12.10.1919 en Dolní Suché, studis en gimnazio en Český Těšín kaj ĉe filozofia fakultato de Karola universitato,

filozofion kaj ĉeĥan lingvon. Post eventoj de 17.11.1939 li estis deportita kun aliaj studentoj al la koncentrejo Sachsenhausen, de tie liberigita en 1942 laŭ interveno de svisa Ruĝa Kruco. Ĝis fino de la milito li devige laboris en la minejo Suchá kiel surtera laboristo. Ĉe la filozofia fakultato li finis siajn studojn sukcese en 1947 kaj komencis instrui kiel mezlerneja profesoro en Místek kaj Český Těšín. Rifuzinte eniri en la komunistan partion post 1948, li devis transiri al elementa lernejo. Per telestudado ĉe naturscienca fakultato en Brno li akiris rajton instrui ankaŭ matematikon. Li transiris al pedagogia gimnazio en Orlová, poste al gimnazio en Český Těšín. En 1949 li edziĝis, havis du infanojn. Post ideologia purigado en 1958 li kiel kristano estis eksikigita el la eduka sistemo kaj trovis lokon de korektisto en presejo en Český Těšín. En 1965 li akiris postenon de analizisto de la unua komputilo en Nova Altforno Klement Gottwald, kie li restis ĝis emeritiĝo en 1977.

Li longe laboris en la „subtera eklezio“, kateĥizis studentojn en privataj loĝejoj, kion li daŭrigis eĉ post 1990, kiam li estis jure rehonorigita.

Kiel esperantisto li estis membro de EK Haviřov. Li helpis korekti gazetojn

Starto kaj Dio Benu kaj ankaŭ librojn (ekz. *Nova Realismo* de B. Vogelmann). La 10-a kongreso de ĈEA en Chodov 2002 lin elektis honora membro.

En 2001 forpasis lia edzino, en 2003 lia filino. En 2008 li trovis lokon en emeritejo en Jablunkov, kie li legis kaj prelegis por la ceteraj emeritoj.

*EK Haviřov*

## Helmar Frank

(1933-2013)

La 15-an de decembro 2013 forpasis Prof. Helmar Gunter Frank, fondinto kaj motoro de Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino (AIS). Li naskiĝis la 19-an de februaro 1933, doktoriĝis en 1958 ĉe filozofo Max Bense. Frank fariĝis esploristo kaj aŭtoro de apliko de kibernetiko al estetiko, pedagogio kaj psikologio. En 1963 li fariĝis profesoro ĉe la kibernetika katedro de la Pedagogia Altlernejo de okcidenta Berlino. Ekde 1972 li laboris en la Universitato de Paderborn. Esperanton li lernis en 1974 kaj decidis apliki ĝin en scienco. Konataj estas liaj laboroj pri propedeŭtiko de Esperanto. Samjare li kunfondis Eŭropan Klubon, en 1998 li ricevis Federacian Meritkrucon. AIS sub lia gvido disvolvis gravan sciencan agadon per la Internacia Lingvo. Printempe 2013 liaj amikoj kontribuis al lia festlibro *Littera Scripta Manet*, kiun redaktis lia edzino Věra Barandovská-Frank.

**Ljubomir Trifončovski** (1958-2013), redaktoro de Literatura Foiro, sekretario de Esperanta PEN-Centro kaj vickonsulo de Esperanta Civito forpasis la 25-an de decembro 2014.

# KALENDARO 2014

2014-03-7/9 Trejnaktivula Renkontiĝo de Esperantistaj Junularaj Organizoj en Svitavy

Info: [dvor.libuse@seznam.cz](mailto:dvor.libuse@seznam.cz)

2014-03-15 Okcidentbohemia regiona renkontiĝo

Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)

2014-03-22 Tabloludoj en Svitavy

2014-04-4/6 La 5-a BIERO en Havlíčkův Brod

2014-04-26 Regiona renkontiĝo en Litomyšl

Info: [svitavy@esperanto.cz](mailto:svitavy@esperanto.cz)

2014-04-30/-05-04 Bibliaj Tagoj en Tuchoměřice u Prahy,

Info: [stefanlepping@gmx.de](mailto:stefanlepping@gmx.de)

2014-05-12/18 Seminario en Skokovy

Info: [drahotova@esperanto.cz](mailto:drahotova@esperanto.cz), tel. 720 652 320

2014-05-13/18 La 9-a Sabla Printempo en Skokovy,

Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)

2014-05-17 Printempa regiona renkontiĝo en Bludov,

info: [kvidojanik@seznam.cz](mailto:kvidojanik@seznam.cz)

2014-06-14 Esperanto-tago en Pardubice

Info: [pardubice@esperanto.cz](mailto:pardubice@esperanto.cz)

2014-06-15 Grimpado al Granda Ĉantorio

Info: [leontodo@centrum.cz](mailto:leontodo@centrum.cz)

2014-07-13/26 Dua etapo de SET Lančov

2014-07-27/08-08 Tria etapo de SET Lančov

2014-08-08/10 Renkonto de ekstendaranoj en SET Lančov

Info: [let.lancov@seznam.cz](mailto:let.lancov@seznam.cz)

2014-09-12/14 Renkontiĝo de ĉeĥa IKUE-sekcio en Svatý Kopeček ĉe Olomouc,

Info: [m.svacek@seznam.cz](mailto:m.svacek@seznam.cz)

2014-09/ 13 aŭ 20 Postferia Renkontiĝo en Strž apud Dobříš

Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)

2014-09-27/28 Inaŭguro de la ekspozicio "Esperanto kaj kolektado", Tutŝtata filatela ekspozicio + Kleriga dimanĉo en Svitavy,

Info: [svitavy@esperanto.cz](mailto:svitavy@esperanto.cz)

2014-10-24/26 ĈEA-Kongreso en Prostějov

Info: [cea@esperanto.cz](mailto:cea@esperanto.cz)

2014-10-30/11-02 3-a Internacia Esperanto-Lernejo en Bartošovice

Info: [verdastacio@gmail.com](mailto:verdastacio@gmail.com)

2014-11-13/16 Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST),

info: <http://kaest.ikso.net/>

2014-11-29 AnkRo Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)

2014-12-13 Marcipana Kristnasko en Svitavy

Info: [svitavy@esperanto.cz](mailto:svitavy@esperanto.cz)

Kalendaro de migra ekspozicio "Ĉu Esperanto estas morta lingvo?"

(ĝis nun prezentita en 27 institucioj en 23 urboj en 9 regionoj de Ĉeĥio)

2014-03-04/27 Studa kaj scienca biblioteko en Plzeň

2014-04-2/25 Kastelo Spálené Poříčí

2014-05-2/26 Urba biblioteko en Lanškroun

Info: [pavla.dvorakova@esperanto.cz](mailto:pavla.dvorakova@esperanto.cz)

## Letní esperantský tábor Lančov 2014

1. běh – se neuskuteční

2. běh 13.7. - 26.7. 3 950 / 4 250 Kč

3. běh 27.7. - 8.8. 3 850 / 4 130 Kč



Nižší cena je pro esperanto, vyšší pro jiné jazyky (angličtina, němčina, na druhém běhu i španělština a ruština).

Tradiční setkání bývalých táborníků bude 8.8.-10.8.2014. Třetí běh je o den kratší, proto je cena nižší.

Esperanto EO BOX, 674 01 Třebíč

[let.lancov@seznam.cz](mailto:let.lancov@seznam.cz)

tel.: 604 940 663, 605 951 234

<http://set-lancov.cz/>



## Jak platit svazu

**Pozor, změna účtu!**

**Nyní Fio banka Svitavy**

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,  
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,  
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio
- 80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

## Averaĝa aĝo de esperantistoj en Svitavy malkreskis

Nome, alveturis junaj esperantistoj al la unua renkontiĝo nomata CENTREJO (Centr-Eŭropa Najbara Trejnaktivula Renkontiĝo de Esperantistaj Junularaj Organizoj).

De vendredo la 7-an ĝis dimanĉo la 9-an de marto 2014 ĉirkaŭ 15 partoprenantoj diskutis pri disvastigado de Esperanto inter la publiko.



Post labora sabato okazis en dimanĉo planita promeno al la fontoj de la rivero Svitava (vidu foton). Antaŭ la celo atendis kun siaj scioj instruisto Jan Richtr, kiu mallonge rakontis pri la lokaj faŭno kaj historio.

*Matěj Nárožný*

**Periodikum Českého  
esperantského svazu - 45. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**starto@esperanto.cz**

**http://www.esperanto.cz/starto**

**Předplatné v Česku (bez členství ve  
svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:**

**p/a Vratislav Hirsch, Ruprechtov 117,  
683 04 Drnovice,**

**vratislav.hirsch@esperanto.cz,**

**tel. 517 444 117**

**Uzávěrka příštího čísla: 7.5.2014**

---

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio -  
- 45-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj  
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster  
Eŭropo 13 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**elektronika versio PDF 6 eŭroj**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, starto@esperanto.cz**

**http://www.esperanto.cz/starto**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero:  
7.5.2014**

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**

## **La 10-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio**

**2014-07-6/12 en Rijeka (Kroatio)**

Pinta internacia aranĝo kun riĉa  
programo prelega, kultura kaj eks-  
kursu, nepre rekomendinda kiel  
alternativo al ĉi-jara UKo okazonta  
ekstereŭrope.

**http://eeu-kongreso.webnode.com**

**Info: eeu@europo.eu**

## **Tutslovakia Esperanto- Renkontiĝo**

**2014-05-22/25 en Martin**

**http://www.ter.esperanto.sk/**

**Info: [stano.marcek@gmail.com](mailto:stano.marcek@gmail.com)**

## **La 91-a Germana Esperanto- Kongreso**

**2014-05-6/9 en Erfurt (Turingio)**

**Ĉeftemo:**

"Renkontiĝo meze de Eŭropo"  
kunvenoj, fakaj prelegoj, kunsidoj  
de fakaj grupoj, pluraj ekskursoj  
Loĝado en dulita ĉambro 20,- €  
ponokte,

rabatita programkotizo por  
eksterlandanoj 65,- €.

**Kontakto: d-ro Rudolf Fischer,  
Gustav-Adolf-Strasse 2a, D-48356  
Nordwalde, tel. 0042573 / 626,  
poŝtelefono 0049 151 51 33 67 94**

**Retadreso: [gek2014@esperanto.de](mailto:gek2014@esperanto.de)**

**Detalaj informoj troviĝas en  
<http://www.esperanto.de/gek/>**



Jarkunveno en Vítkovice



Jarkunveno en Brno



Kluba solenaĵo en Písek – 88-jariĝo de Marie Dvořáková



Junulara CENTREJO en Svitavy



Esperantistoj kun prof. Tonkin antaŭ la sidejo de Asocio de Tradukistoj kaj Interpretistoj



Margit Turková prezentas la poezion de Otokar Březina kaj Esperanton en la kunveno de rusoj en Moravio. Ŝi tenas kompletan verkaron de Březina en la rusa kaj la plurlingvan libreton *Moje matka – Mia patrino*, en kiu aperis ankaŭ la rusa traduko. Jam

tri poemaroj de la rusa poetino el Brno Ljubov Vondroušková, prezidantino de la rusa minoritato en la suda Moravio, aperis en esperantaj tradukoj de Jaroslav Krolupper.